

# Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 194 (2015:2)

Apr – Jun 2015

## Disvastigado de Esperanto en Grandaj Eventoj

Rafael Zerbetto



## Kiel Malsana Sansistemo Sanigis min

Jana Kamenická

Post semado,  
venu rikoltado

Projekto  
*Esperanto ĉe “Bienal”*

III  
(Pablo Neruda)

# Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 194 (2015:2)

Apr - Jun 2015

74-a jarkolekto

**Redaktas:** Fernando Pita

**Aranĝas:** Allan Argolo

**Ĉi-numeraj kunlaborantoj:**

Rafael Henrique Zebetto,

Maira Nobre, Dirce Sales,

Jana Kamenická, Allan Argolo

kaj Paulo Nascentes.

**Kovrilo:**


Rio Esperantista.



Associação Esperantista do Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302


telefono: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com  
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto


 youtube.com/user/TVaerj



**Rio Esperantista**

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro – dezembro/ 2010



**RIO**



**ESPERANTISTA**

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO No 18 JANUARO - MARTO 1997



**Enhavo**

- El la Redakcio \_\_\_\_\_ 3
- Diskonigo de Esperanto en ... \_\_\_\_\_ 4
- Projekto Esperanto ĉe “Bienal” \_\_\_\_\_ 7
- Balo! \_\_\_\_\_ 10
- Kvizo \_\_\_\_\_ 10
- Kiel la malsana sansistemo sanigis ... \_ 11
- Post semado, ni kultivu kaj rikoltu \_\_\_\_ 17
- III (Pablo Neruda) \_\_\_\_\_ 18

Jen ni denove!

Jes, plia numero de via Rio Esperantista eliras el la forno, por ke vi povu ĝui la novaĵojn de via movado!

Ĉi-foje ni alportas por vi multajn rakontindaĵojn, ĉar dum la lastaj monatoj via Asocio multege laboris: en Aprilo, krom apogi niajn samideanojn el Nitek en sia jam tradicia esperantista librofoiro, ni organizis nian tradicionan instruistan trejnadon kie instruistoj kaj instruantoj de Esperanto kunvenis por diskuti la situacion de niaj kursoj kaj kundividi novajn teknikojn por instrui lernantojn.

En Majo ni, kiel kutime, okazigis nian Ŝtatan Renkontiĝon, kie oni denove estis inter la samideanaro kaj por pensi nian movadon kaj por diskuti niajn strategi-ojn; dum ĝi, okazis bonegajn prelegojn de niaj samideanoj Carlos Alberto kaj Rafael Zerbetto, kiuj kaptis ĉies atenton, kaj balotado de nova estraro de nia asocio. Post la renkontiĝo, nia kara Zerbetto prezentis al ni kelkajn ideojn por diskonigo de Esperanto en grandaj eventoj, kaj sintezo de lia parolado estas publikigita ĉi-numere.

En Junio, celante trejnadon de la stabo kiu deĵoros en nia budo ĉe “*Dujara Librofoiro de Rio-de-Janeiro*”, ankaŭ konata kiel “*Bienal do Livro*”, nia samideanino Maira Nobre ricevis la eksprezidanto de BEL, Pedro Cavalheiro, kiu ofertis al ni dutagan kurson pri homaj rilatoj, ĝusta disvastigado de Esperanto kaj teknikoj por disvendado. Partoprenintoj multege lernis kaj interŝanĝis novajn kaj oldajn ideojn pri la vojoj ekde nun sekvotaj de la movado en Rio. Kaj, por ke ĉiuj estu konsciaj pri kio vere ni



celas pere de nia projekto ĉe *Bienal*, Maira Nobre preparis klarigan tekston por ni.

Fakte, Maira multege laboras por tiu projekto, ŝi eĉ vojaĝis al Lorena, reprezentante nian asocion en la Renkontiĝo de la Paraíba-Valo, kie ŝi, eĉ frostante, prelegis pri ĝi. Krome, ŝi vizitas diversajn grupojn en Rio kaj proksimaj urboj, prelegante kaj klarigante esperantistojn pri tiu nia projekto.

Kaj plie, ĉar neniu estas farita el fero, AERJ okazigis Esperantistan Balon, okazinta en la Karioka Kultura Centro, tie ĉiuj dancis kaj amuziĝis. Kaj kelkaj personoj jam petas al ni organizi alian!

Fine, ĉar brazilanoj ĉiam plendas pri sia sansistemo, ni alportas por vi tekston de nia slovaka amikino Jana Kamenická, kiu montras, ke tiuspeca problemo ne ekzistas nur ĉe ni. Oni ankaŭ alportas version, far Paŭlo Nascentes, de unu el la plej belaj poemoj de la plej latinamerika el la poetoj Pablo Neruda! Ĝis la venonta!

Fernando Pita

Ni aparte pardonpetas pro la ĉi-numera malfriiĝo, kiu fontis el malfrua grafika aranĝado. Malgraŭ ĉio, ni daŭre provas regali la legantaron per sufiĉe plaĉa grafikaĵo. Do, espereble, ĝuu vi!





Rafael Henrique Zerbetto<sup>1</sup> - Campinas

Ekzistas du bazaj informoj fluas inter la partoprenantoj kategorioj de kaj ĉiuj kune serĉas interkonsenton. grandaj eventoj: Aliflanke, en ekspozicioj kaj foiroj la naciaj kaj internaciaj. En tiuj lastaj, lingvaj baroj kaj miskomunikado estas okulfrapaj. Konsekvence, la graveco de internacia komunikado fariĝas evidenta kaj eblas uzi tiun konstaton je nia profito. Naciaj eventoj, siavice, celas publikon kiu havas komunan lingvon, kaj kiu kutime ne spertas lingvajn problemojn en ĉiutaga vivo.

Alia maniero klasifiki tiujn eventojn estas laŭ celo: en kongresoj kaj konferencoj homoj debatas specifan temon, kaj gravas ne nur prezenti propran vidpunkton al aliuloj, sed ankaŭ konatiĝi kun alies vidpunktoj, ĉar

informoj fluas inter la partoprenantoj kaj ĉiuj kune serĉas interkonsenton. Aliflanke, en ekspozicioj kaj foiroj la celo estas prezenti al la publiko variajn kaj projektojn. La publiko pasive ricevas la informojn, eventuale demandas pri la varo, sed ne povas influ la agon de la ekspozicianto, tiel ke la informoj fluas nur de tiu al la publiko, krom en esceptaj kazoj.

En 2012, en Rio-de-Ĵanejro, mi partoprenis en Youth Blast, la jarkunveno de UN-fakgrupo pri Junularo kaj Infanaro. Tiu evento estas menciinda ĝuste ĉar ĝi estis miksa (parte nacia kaj parte internacia), kun dutaga programo ekskluziva por brazilanoj, kaj sekve tri tagoj kun partoprenantoj de la tuta mondo kaj kvar oficialaj lingvoj: la portugala, la angla, la his-



pana kaj la franca. La du laste menciitaj lingvoj estis uzataj nur en laborgrupoj, dum en podiaj diskutoj oni nepre devis paroli angle aŭ portugale, kun samtempa traduko nur inter tiuj du lingvoj. Dum la du unuaj tagoj la ĝenerala sinteno estis tiu, ke Esperanto ne estas necesa ĉar la angla sufiĉas por internacia komunikado. Matene de la unua internacia tago, tiuj brazilanoj estis entuziasme babilantaj en baza angla kun la eksterlandanoj, tamen tuj post la komenco de la debatoj evidentiĝis por ili ke denaskuloj regas la lingvon multe pli bone kaj malfacilas akompani iliajn paroladojn kaj pro la rapido, kaj pro manko de faka vortprovizo, krom aliaj lingvaj nuancoj. Multaj el tiuj brazilanoj ne revenis por la sekva tago, dum kelkaj kontaktis la reprezentantojn de TEJO por informiĝi pri Esperanto, kaj ili sin montris simpatiaj al nia agado post sperti la problemon.

Lingva diskriminacio ankaŭ estas kutima en internaciaj eventoj. En Rio+20 mi vidis multajn indiĝenojn irantajn tra la koridoroj sen partopreni debatojn pro nescio de fremdaj lingvoj. Plie, dum la Monda Junulara Forumo, pasintjare en Srilanko, kies oficiala lingvo estis la angla, ĉiumatene estis paroladoj de invititaj fakuloj,

kun samtempa traduko en kvin lingvoj. Tamen, preskaŭ neniu partoprenanto havis la kutimon preni kapaŭskultilojn, kaj iumatene, post du sinsekvaj paroladoj en la angla, ministro el iu afrika lando prenis la mikrofonon kaj komencis paroli france. Jen la reagoj de la spektantaro: preskaŭ duono de la homoj eliris la salonon, kelkaj revenis kun kapaŭskultiloj, sed preskaŭ ĉiuj simple ne revenis. Inter tiuj, kiuj restis, plejparto preferis labori aŭ amuziĝi per tekkomputilo aŭ poŝtelefono. Jen bildo de la lingva situacio en la mondo.

Esperantistoj devas esti atentaj al epizodoj kiuj evidencigas lingvan diskriminacion kaj komunikajn problemojn por tiel atentigi homojn pri tiuj problemoj. Menciitaj epizodojn okazintajn en aliaj eventoj estas alternativo por atentigi pri lingvaj problemoj en naciaj eventoj, kiam ili estas ege maloftaj pro la komuna denaska lingvo de la partoprenantoj.

Tamen kiel prezenti Esperanton al la homoj? La plej grava konsilo, kiun



WORLD CONFERENCE  
ON YOUTH 2014

mi povas doni estas la jena: ĉiam estu honesta. Multaj samideanoj troigas la facilecon de Esperanto, kaj konsekvence homoj matrikuliĝas en kursoj kredante ke la lingvo estas multe pli facila ol ĝi fakte estas, kaj post frustrigi per la reala sperto ili povas senti sin trompitaj kaj havi malfavoran opinion pri la lingvo.

Mi diversfoje rimarkis en ago-tagoj kaj similaj eventoj, ke kelkaj homoj petas al Esperantistoj paroli ion en la Lingvo Internacia, tamen en tiu momento multaj ne scias kion fari. Parkeri interesan frazon povas esti bona maniero elturniĝi, sed mi preferas alian strategion: mi min prezentas en Esperanto: “mia nomo estas...”, tuŝante mian bruston per mia mano dum mi parolas “mia”, por helpi la personon diveni la signifon de la frazo. “Nomo” sonas simile al la portugala vorto “nome”, do la persono kapablas kompreni la frazon. Eblas ankaŭ demandi “kiu estas via nomo?”, prefere fingremontranta la personon dum la elparolo de “via”, por faciligi la komprenon de la frazo. Tiel la persono sukcesas, post iom da klopodo, kompreni la frazojn kaj respondi, kaj per propra sperto sentas ke la lingvo estas facila kaj utila.

Finfine, kiel argumenti favore al Es-

peranto? Francisco Stefano Wechsler, dum prelego en la Sanpaŭlia<sup>2</sup> Kongreso de Esperanto en 2012, asertis pri la ekzisto de ses klasoj de argumentoj kontraŭ Esperanto:

1. la alienita sinteno: *oni ne bezonas internacian lingvon*
2. la koloniisma argumento: *la internacia lingvo estas la angla*
3. la kvazaŭlingvisma argumento: *Esperanto estas lingva fuŝaĵo*
4. la fiaska sinteno: *Esperanto ne funkcias kaj fiaskis: kiom da homoj parolas ĝin?*
5. la pragmatisma sinteno: *Esperanto estas senutila*
6. la kristalgloba sinteno: *oni neniam alprenos Esperanton.*

Ĉiuj aliaj argumentoj kontraŭ Esperanto estas esence variaĵoj de tiuj ses supre menciitaj, do precipe kontraŭargumenti ne estas malfacila tasko, kvankam estas vero, ke bona respondo postulas bonan konon pri la lingvo, ĝia uzo, ĝia parolkomunumo kaj ĝia kultura fono.

<sup>1</sup> Zerbetto estas eksprezidanto de BEJO, ano de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO kaj nuntempa komitatano A de UEA por BEL.

<sup>2</sup> Rilatanta al la ŝtato San-Paŭlo.

Maira Nobre <sup>1</sup>

Projekto *Esperanto ĉe “Bienal”*, sub respondecado de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro – AERĴ, disvastigos Esperanton ĉe la 17-a *Bienal do Livro* en Riocentro, Rio-de-Ĵaneiro, de la 3-a ĝis la 13-a de Septembro 2015. Tiu disvastigo de internacia lingvo havos kiel precipa fokuso demandon pri lingvaj rajtoj, kie oni celas atentigi ĉeestantaron pere de alproksimiĝo pli akorda al nia aktuala momento, malsimila ol tiu komune adoptita de la esperanta movado.

Nia budo ne montras stelon nek esperantan flagon, fakto kiu unuavide montriĝos stranga, sed evidentigos nian lingvon mem, kiu estos reprezentita de frazo, trankvile legota de promenanto ĝis tiu momento kiam iu signo – aŭ manko de simileco kun la patra lingvo, portu tiun peti helpon al unu el la deĵorantaj esperantistoj por



Nia budo montras  
ne stelon nek flagon,  
[..] sed evidentigos  
nian lingvon  
mem.

deĉifri tiun eksponitan enigmon. Tio, ni pensas, generos scivolemon kaj nekomunajn eblecojn. Aliflanke, oni forlasis la antikvajn simbolojn por ke tio ne

antaŭenigos kontraŭ-produkteman neigon, enradikiĝintan antaŭjuĝon aŭ sennecesa disigo. Tiu evento estas fundamente por neesperantistoj, aŭ, plibone, por estontaj esperantistoj.

La buda infrastrukturo havos 40"-an televidaparaton (aŭ plibone, du) enhavanta specifajn atrakciojn por ĉiu celpubliko.

Dumtage, tiu estos formita precipe el antaŭadoleskaj lernantoj, venintaj el lernejoj de Rio-de-Ĵaneiro, preskaŭ ĉiuj markita por viziti la foiron, kiu, post la 17-a, revenas al siaj domoj pere de aŭtobusoj. Dumnokte, la atrakcioj ŝanĝiĝas, kaj la ĉeestantoj ankaŭ, nun formita de intelektuloj, libronegocantoj, literaturistoj, legantoj kaj ceteraj adoltoj.

Krom la televido, oni havos komputilon por montri al la ĝenerala publiko esperantistan realecon, en kaj eksterlanda. Oni ankaŭ pripensas la eblecon realigi realtempajn videokonferencojn inter deĵorantoj kaj eksterlandaj esperantistaj grupoj, se oni disponos bonan retkonekton. Ekspozicio de libroj montras nian originalan beletron, esperantaj versioj de famaj ver-



koj de brazila kaj eksterlanda literaturo, infana beletro, lernolibroj kaj vortaroj, kondiĉe ke ili ne prezentu iun ajn religian trajton. Laŭ esploro farita en aliaj librofoiroj, furoraj verkoj ĉe la publiko estas: *Asteriks*, *La eta princo*, kaj *Tinĉjo*, ĉiuj jam en Esperanto. Eta tablo kun porinfanaj libroj restos ĉe unu el la anguloj de la budo, por ricevi infanoj, kaj bendo, antaŭ la okuloj de la infanoj, estos sur parto de la budo.

Oni pritraktas la eblecon vendi librojn, kaj tiu aro estos selektita laŭ aktuala, altiriga fasonado, kaj puraj paĝoj, celante montri, ke Esperanto estas pli aktiva ol neniam antaŭe. Nia spaco valorigos tiun neŭtralecon kantita verse kaj proze tra Esperantujo. Ĝenerale, ideo estas, ke Esperanto montru sian vangon, ĉu per literaturo montrita de la informadika kaj multvoja teknologio. Vango moderna, mojosa kaj tentakla, tuŝanta ĉiujn partojn de la ĉiutaga hodiaŭa vivo. Ni celas surprizigi tiujn, kiuj ne havis ankoraŭ la plezuron koni ĝin, kaj tiujn, kiuj ĝin vivas laŭ torditaj ideoj.

Disvastigonta skipo ricevis dutagan trejnadon – de la 15-a ĝis la 20-a horo, dum la 5-a kaj 6-a de junio. Tiu trejnado okazis en la Kultura Koooperativo de Esperantistoj kaj estis gvi-

data de Pedro J. Cavalheiro, prezidanto de Brazila Ĉambro de Internacia Lingvo Esperanto. Tiu trejnado daŭros, de malproksime, sub kunordigo de Rafael Zerbetto, de Brazila Esperantista Junalara Organizo (BEJO). Nur tiuj esperantistoj kiuj partoprenis la trejnadon rajtos labori ĉe la budo en *Bienal*, kaj estos identigitaj per propraj ĉemizoj, ĉar foira organiza skipo monpunos AERĴ-on, kaze aliaj personoj faros alispican disvastigon.

Tiuj trejnadoj celas alĝustigi kelkajn malligitajn ĉenerojn kiuj konsantiĝas en nia movado kaj kiuj finfine damaĝis intencojn la plej belajn, sed naivajn. Oni celas ne nur disdoni faldfoliojn sed, ankaŭ, krei fortan retmesaĝan liston, ekde la farotaj kontaktoj, por ke nia partopreno en *Bienal* daŭre alportu dividendojn por Esperanto, eĉ post ĝia fino. Estos starigita(j) baza(j) kurso(j) de Esperanto en AERĴ, du aŭ tri semajnoj post la foiro, por servi al interesitoj en lernado de internacia lingvo, por ke tiuj ne



**Pedro Cavalheiro dum ĉeesta trejnado en KKE.**



atendu longan periodon ĝis la venonta lernjaro. Ĉar eblas ke nia spaco ne povos ricevi ĉiujn interesintojn, oni ofertas retkonektan kurson de Túlio Flôres, partnere kun AERĴ, kiu ankaŭ kunigas tiun ideon pri aktualecon de Esperanto.

Por instruistoj nin vizitontaj ĉe Bial, oni ofertas interparolon pri *Propedeŭtika Rolo de Esperanto – fonetika kapabligho de elparola sistemo*, fare de Pedro Cavalheiro, semajno tuj post la fino de la foiro, kiuj rajtigos ilin al lunĉo kaj laŭsorta disdono de libroj en AERĴ. Nia propono estas altiri opiniformantojn por fari el ili simpaticiantojn de Esperanto.



Kvankam tiu ĉi teksto estas rapida skizo, per ĝi eblas travidi, ke projekto *Esperanto ĉe Bial* kunigas aktivecojn kiuj okazas antaŭ kaj post la evento mem. Kiel antaŭa aktiveco, ni citas prezentadon de tiu-ĉi projekto ĉe la grupoj de Rio-de-Janeiro (tamen ĝi okazis ankaŭ dum la renkontiĝo de Lorena, San-Paŭlo), kies celoj estas integriĝo, disvastigo kaj kunlaboro. Tiu lasta ne devige permona, sed kiel fonto de sugestoj kaj interŝanĝo de spertoj kiuj levas, en ĉiuj, senton de rekta partopreno, kiel aktivaj protagonistoj.

Estus interese kalkuli kun esperantistoj kiuj pretas viziti lernejojn, paroli al lernejestroj, instruistoj kaj kunordigantoj, celante sentigi ilin por ke ili kunportu siajn lernantojn al nia budo. Ni petas, al la interesitoj, ke ili kontaktu nin per nia retpoŝto<sup>2</sup> por ke ni kune planu la utiligota alproksimiĝo.

Ni estas konsciaj ke estas nenia garantio ke tiu modelo adoptita estos trafa, tamen, sendube, estas movo celanta krei ion novan rilate al disvastigo de Esperanto ene de pli profesia propono, kiu pripensas la antaŭon, la dumon, kaj la posteventon. Diversaj laborfrontoj estas ellaboritaj por ke ni estu sukcesaj en tiu tasko, ankoraŭ nerealigita, ĉe *Bial do Livro do Rio de Janeiro*, cele al prezentigo, al ĉiuj personoj, de io kio jam apartenas al ili, ĉar apartenas al tuta homaro: Esperanto.

<sup>1</sup> Maira Nobre estas estrarano de AERĴ pri Disvastigado kaj kunordiganto de la projekto *Esperanto ĉe Bial*.

<sup>2</sup> [disvastigo.aerj@gmail.com](mailto:disvastigo.aerj@gmail.com)

Je la 13-a de junio 2015, la konata kaj eleganta festsalono de *Centro Cultural Carioca* (Karioka Kultura Centro), kiu situas ĉe Placo Tiradentes, Rio-de-Janeiro, estis ornamita per la verda flago de Esperanto!

Tie ĉeestis 62 gajaj esperantistoj, kiuj senĉese dancis, kantis kaj festenis je la oportuneco kuniĝi por amuze labori favore al la movado, ĉar la profito de la balo finance kontribuis al la stando de Esperanto en la venonta *Bienal do Livro do Rio de Janeiro*.

Dum la balo oni ankaŭ festis la datrevenon de nia kara kaj aminda samideanino Tania Paixão, kiu eĉ regalis la

ĉeestantaron per tre bongusta kuko.

Tiu kiu ne partoprenis, mistrafis bonan oportunon!

Ni profitas la okazon por gratuli kaj samtempe danksprimi al la muzikistoj Mauro (klavaro kaj voĉo) kaj Sidnei (voĉo) pro la bonkvalita spektaklo, kiu redonis al ni la dolĉajn rememorojn de nia juneco, kaj al la simpatia administracia skipo kiu ĉeestis en la salono.

Aldone, ni plezure informas al nia prezidanto, Marcio Santos, ke pluraj esperantistoj petas kaj atendas alian balon. Venu do, alia!

## **Kvizo**

Tiu, kiu diris, ke la foto en nia antaŭa numero montris la Palacon *Mourisco*, antikva sidejo de la futbala klubo Botafogo, ja pravis!

Do nia ĉi-numera kvizo: kie estas tiu preĝejo? Ĝi staras en la sama loko ĝis hodiaŭ kaj ne estis riparita!



Jana Kamenická<sup>1</sup> - Slovakio

Slovakio. Malgranda eŭropcentra lando, 5 milionojn da loĝantoj, pluraj milionoj vivas eksterlande. Sur la vojo de socialismo al demokratio ni devojiĝis kaj nun ni vagas en la laberinto de la densa koruptĝangalo.

Antaŭ nelonge mi ekkomprenis la esencon de la proverbo: *Mi travi-vis malgraŭ la kuracista flego.*



### Aperas Doloroj

La 1-an de januaro 2005: ĉiuj najbaroj ankoraŭ dormas post la longa finjara festado. Frumatene vekas min fortega abdomena doloro. Mi vokas la ambulancon. Post kelkaj momentoj, en la enirpordo aperas laca kuracisto. “Feliĉan novan jaron”, salutas min ridetema simpatikulo. “Pli gajan komencon mi ne povus imagi, doktoro”. Vespere mi manĝis kelkajn litrojn da acidaj kukumoj kio ne plaĉas al mia stomako. Alkoholaĵojn mi ne drinkis. Kuracista mieno malkaŝas, ke li kredas nek unu vorton al mi. Gravas, ke la injektita likvaĵo en mian postajojn rapide efikas kaj forŝovas la doloron en la forgeson.

Dum ses sekvontaj jaroj (krom du esceptoj) ni revidas ofte unu la alian. “Resaluton, sinjorino”, “ĉu vi daŭre

ŝatas acidajn kukumojn?”, “Denove vi deĵoras, doktoro, kia bela hazardo!””. Sen longa diskuto la injektonadlo kisas mian postajojn kaj rapide malaperigas la spasmojn.

De la kolegoj de tiu kuracisto mi eksciis, ke li dumtage dormemas en sia laborejo kaj nokte deĵoras por ricevi duoblan salajron, kiun li donas al sia filino, studentino en la universitato.

Unu foje la atako subite surprizigis min en Francio, en la Muzeo de Modernaj Artoj. La dungintinoj vokis la ambulancon, kiu alvenis je la tria alvoko! La kuracisto longe ekzamenis la aferon, poste finfine decidis injekti min la atenditan likvaĵon, kiu



“vekas min fortega abdomena doloro”

ekefikis nur post longaj 45 minutoj. Mi preferas *mian* noktan kuraciston.

La dua escepto estis humora. Vespere, ĉirkaŭ la sepa, mi rimarkis komencantajn dolorojn. Por ke mi ne devus vekigi la kuraciston je la 3-a frumatene, mi decidis iri en la deĵorantejon kaj peti mian savlikvaĵon tuj. Nekonata deĵoranta kuracisto, kiu trovis mian peton stranga, preskribis al mi psiko-farmakojn kaj forĵetis min el la konsultejo. Reciproke mi forĵetis la recepton en la rubaĵejon kaj je la 3-a mi tamen vekigis la kuraciston.

La lasta atako alvenis dum la ŝvitado en saŭna paradiso. Anstataŭ ĝui belan vesperon kun geamikoj, mi resalutis “mian” simpatikulon. Li ne plu ridis. Kelkaj tagoj antaŭe mortis en nia urbo 24-jara virino, ĉe kiu la kuracistoj ne rimarkis grandan stomaktumoron. Estiĝis skandalo. “Sufiĉas, sinjorino”, li diris rigore, “ĉe venonta atako vi lasos analizi vian sangon!”, “Fino de la ludo!”.

### **Nova Amiko**

Fine de 2010 mi ekkonas la neniarmidedantan gastroenterologon. Unue li ŝovas longan gumtubon en mian stomakon, fortranĉas kelkajn pecetojn el ĝi por konstati, ke ĝi bonfartas. Ĉe la

dua vizito li ŝaltas sonografon, trovas ŝtonetojn en mia galveziko. Mi ne komprenis, kial li unue ne aplikis la sonografion kaj suferigis min per la endoskopo. “Sciu”, flustras la flegistino, “por endoskopio li ricevas multe pli da mono de la sanasekuro ol por la sonografio”. La kuracisto sugestas operacion. Mi aŭdis hororojn pri nia hospitalo, sed la kuracisto klarigas al mi: “tri truetojn en via ventro vi eĉ ne rimarkos kaj post tri tagoj vi povos reiri laborejon”. “Facila interveno”. Mi klopodas kredi al li, tamen, mi ŝanĝas la manĝsistemon, la atakoj malaperas. Du jarojn poste mi decidas peti enhospitaliĝon. “Post kvar monatoj, sinjorino, je la sepa matene”. La indikita tago hazarde koincidas kun mia naskiĝtago. Bela donaceto.

### **Hospitalen**

La hospitalon mi eniras kun plena kofro, ĉar en nia sansistemo mankas mono. Vi devas kunporti eĉ sapojn, mantukojn, rulaĵojn de neceseja papero, naztukojn, ktp. Mi okupas la ĉambron kun du aliaj sinjorinoj. Unu jam ripoziĝas post la operacio. La alia, 84-jara simpatikulino, Maria, venas kun mi. Posttagmeze okazas stranga afero. En la pordo aperas nervoza flegistino skermanta kun antikva raz-



aparato, kiu ŝajnis esti uzita jam dum la unua mondmilito. “Venu kun mi”, ŝi fingromontras al Maria, kiu pekis, ĉar hejme ŝi ne razis ĉiujn siajn harojn, haretojn kaj haretetojn, do la flegistino zorgeme senharigis ŝin. “Mi nenion komprenas”, miras Maria, “oni ja tranĉos min en la gorgon”. “Regulo de la reĝo”, klarigas la flegistino. La reĝo (komprenu ĉefĥirurgon) ĉiuj timas. Poste la flegistino esploras mian harstaton kaj konstatas gravajn kaŝitajn mankojn! Feliĉe mia kofra ekipaĵo enhavas unu modernan razaparaton kaj mi povas atingi deziratan haŭtpurecon uzante ĝin. La rezulton denove rigore kontrolas la sama flegistino. “Ĉio en ordo”, ŝi kontentas. Mi ĝojas.

La sekvontan tagon, mi havas la honoron esti la unua en la vico. Mia naskiĝtago. Mi “festas” frostante sur operacia tablo, ĉar mi ne rajtis manĝi dum la lastaj 24 horoj. Mi klopodas klarigi al la teamo, ke kutime mi havas malaltajn sangopremon kaj pulson, kiu post operacioj ankoraŭ plimalaltiĝas. Oni ne bezonas paniki vidante tre malaltajn ciferojn sur la ekrano.

Iam posttagmeze mi vekiĝas en sektoro de intensa flegado, ĉirkaŭita de multaj aparatoj konektitaj pere de

pluraj diversspecaj kabloj al mia korpo. Mi iomete moviĝas kaj sentas doloron en la brusto. “Doktoro, ... embolio?”, mi aŭdas flustri la deĵorantan flegistinon en la telefonan parolilon. Ĉe mia lito aperas kvin blankvestitaj personoj. Unu el ili mi ekkonas, estas ja ĉefĥirurgo, mia operaciisto. Ili



**Reĝo, la ĉefĥirurgo,  
pretas por la ĥirurgio**

observas min, nemulte parolas, rigardas en la ekranojn. Mi ridetas, ili foriras. Mi travivas, mia telefono ne. Ĝi difektiĝis ĝuste en tiu momento. Mi restas sen ebleco kontakti miajn familianojn, ĉar mi ne konas parkere iliajn telefon-numerojn.

Venontmatene mi jam translokiĝas al mia ĉambro. Maria ĝojas revidi min, la tria koleginino foriris hejmen. Kune ni pasigas semajnfinojn. La hospitala personaro malofte vizitas nin. Eĉ la deĵoranta kuracisto faras la kontrolviziton dume ni vespermanĝas en la manĝejo, ĉar ŝajne nur tiam li havas tempon por “vidi” nin. Almenaŭ la familianoj trafas pli taŭgan momenton.

“Mia ventro doloras pli ol hieraŭ, ĉu estas normale?”, “Ne diru stultaĵojn”,

grumbblas je cigaredoj terure malbone odoranta flegistino.

Lundo. La unuan fojon mi spektas mian, ĝis tiam kaŝitan, vundon: longan tranĉon tra la tuta ventro, tri truojn de laparoskopio kaj strangan brunan raspecan makulon. Malbela bildo. La kuracisto decidas apliki glacion por aktivigi la resaniĝon. Mi protestas, ĉar mi tute ne toleras malvarmaĵojn. Vane. Krome mi petas venigi dietologon. Ni ricevas neniun freŝan frukton, neniun legomon, neniun fibron. Per tiu peto mi furiozigis al ĉiu personaro.

La trian liton okupas 50-jara Vera. Ŝia galveziko estas plena de ŝtonoj, oni promesis al ŝi rapidan solvon: laparoskopion. Sed spektante mian ventron, ŝi ektimis, decidis ne lasi operacii sin en tiu hospitalo, venigis sian edzon, montris al li miajn vundojn kaj forlasis nin. La kuracistoj ankoraŭ pli furioziĝas kaj decidas definitive forĵeti min la sekvontan matenon hejmen. Nokte doloregas. Noktomeze mi ellitiĝas por peti unu plian dozon de kontraŭdolorilo. Duonhoron mi atendas la alvenon de la flegistino. “Kial diable vi ne dormas?”, kolere ŝi krias en la enirpordo de la sekcio. Mi ricevas kontraŭdoloran dozon. “Kiom longe

vi atendis?”, ŝi esploras iom pli mallaute. Ŝi konscias pri mia malkovro, ke ŝi forlasis pacientojn. Mi ne demandis, kie ŝi estis.

Mi restas unu tagon pli, ricevas pli da glacio. Alvenas 2 novaj sinjorinoj. “Magda?, ĉu estas vi?”, “Hilda ...?” “Kiom da jaroj...?”, “Se mi bone kalkulas, 67”. Nekredeble! Samhospitalĉambriĝas du iamaj samklas-aninoj el la baza lernejo. La etoso en la ĉambro varmiĝas. Miaj doloroj plifortiĝas. Nokte mi montras la vundojn al la deĵoranta flegistino. Mi certas, ke ili inflamiĝas. Laŭ ŝia sperto, nenio grava okazas, ŝi ne vokos al la kuracisto, ĉar li dormas kaj mi trankvile enlitiĝu. Mi traploras la nokton.

Matene la kuracisto ordigas al mi paki la kofron, dume li skribos la informon. Kun problemoj mi ellitiĝas kaj en tiu momento disŝiriĝas la vundo el kiu elŝprucas granda kvanto da puso. Hilda kun Magda vokas la kuraciston kiu portas min rapide sur operacian tablon kaj purigas la vundon. Terure doloris, ĉar li forgesis apliki morfion. Li organizas la translokiĝon en alian, infekcian sekcion, la hejmveturadon li ne plu mencias. Vespere doloras ankoraŭ pli. Al la kuracisto mi indikas alian flankon de

la ventro. Deĵoras la “Mutulo”. Li neniam parolas kun la pacientoj. Puriĝas nur unu flankon kaj foriras.

Vendredo. Pasis unu semajno post la operacio. Mi plendas. Aperas juna kuracisto, ankoraŭ netuŝata de la aroĝanco de siaj kolegoj. “Mi nun rigardos, kial vi tiom plendas. Mi devas malkudri la tutan vundon, sed ne timu, post kelkaj tagoj ni denove kudros ĝin”. Tiam li trovas grandan absceson plenan da puso kaj sango kaŝitan en la abdomena kavo. Ĝis nun ĝi nur mirakle ne rompiĝis kaj ne kaŭzis sepson. Li alarmas la personaron, zorgeme purigas la absceson, tuj preskribas al mi fortan antibiotikon, prenas sangon kaj sendas ĝin al la laboratorio. La analizo forstrekas la bakterian inflamiĝon.

### **Mi Travivis!**


Kvin tagojn poste mi dankas al la “Junulo” kaj forlasas la hospitalon. Tamen mi devas ĉiutage reveni hospitalen por la purigado de la vundo, kiu dumtempe fermiĝas. Oni disŝiras ĝin en tute ĉirkaŭ 50 foje. Neniu scipovas klarigi al mi, kial ne malaperas la bruna jukanta makulo. Hejme mi pasigas pli da tempo en malvarmega kamomila bano ol en la lito. Tio helpis al mi.

### **Premio**

Duonjaron poste en la kuraĉloko, mi gajnas la neoficialan premion pri plej malbele aspektanta cikatro. Ĉiuj pensis, ke operaciis min iu juna nesperta studento, neniue kredis ke estis la laboro de sperta ĉefĉirurgo. La jukanta makulo daŭre ĝenas.

### **Sanigo**

Mi decidis neniam plu reveni al la hospitalo kaj malsatigi al ĉiuj kuracistoj. Sed, kiumaniere realigi tiun celon? Kiel resti sana? Mi komencis aŭskulti prelegojn, legi librojn, studi diversajn filosofiojn kaj apliki ĉiujn saĝecojn de la alternativistoj kaj antaŭuloj en mian ĉiutagan vivon. Mi miksis konojn el fitoterapio, aromaterapio, kineziologio, akupresuro, ajurvedo, etikoterapio, psikosomatiko kaj transpersonala psikologio. Mi lernis lucide sonĝi. Problemojn mi kapablas solvi tage kaj nokte.



Dum unu promeno tra la naturo, mi surpaŝis longan rustan najlon, kiu vundigis mian kalkanon. Mi ordonis al la vundo saniĝi mem. Ĝi komprenis kaj rapide fermiĝis. Jes!!! Funkcias!!!

Unu jaron post la operacio mi decidis viziti la gastroenterologon, kiu direktis min al la manoj de la ĥirurgoj. Ekvidante min, lia mieno serioziĝis. Li organizis ekzamenadon pere de plej modernaj aparatoj en alia urbo. Bonŝance mi devis atendi nur 2 monatojn!! Poste li konfesis sian suspekton: “mi vere timis, ke la ĥirurgoj forgesis tondilon en via ventro. Feliĉe ne! La dolorojn kaŭzas la adhaŝojj”. “Ĝis neniam, doktoro”, mi ĝoje brakumis kaj adiaŝis lin.

**Nova Komenco**

Mi komencis iom post iom ŝiri la adhaŝojjn kaj sportumi. La jukantan makulon definitive malaperigis la kortikoida unĝento.

La 1-an de januaro 2015: pasis dek jarojn ekde la unua alvoko de la ambulanco. En Germanio mi ĝuas belan sunan tagon kun esperantistoj el multaj landoj. Lastnokte mi festis: kaj dancis, kaj drinkis, kaj manĝis acidaĝojn, kaj saŝnumis – nenio doloras. Ĉiumatenete mi praktikas tajĝiĉuanon

kaj jogon, tagmeze mi plifortigas abdomenajn musklojn kaj finsemajne mi sportumas en la naturo. Tre atente mi manĝas. Sed mi kompre-

nis, ke la sekreto de la sano troviĝas en nia kapo. Se malsaniĝas niaj pensoj, ili malsanigas la korpon. Pensi pri la pasinteco tristigas aŝ kolerigas nin. Pensi pri la estonteco timigas nin. Nur la estanteo gravas. Nun ni devas vivi kaj solvi ĉiuj problemojn. Solvante ilin hodiaŝ, ni solvas kaj la pasintecon kaj la estontecon. La situacioj kaj personoj ne estas bonaj aŝ malbonaj. Ili simple ekzistas. Per niaj pensoj ni juĝas ilin. Niaj “malamikoj” estas niaj instruistoj. Ili lernigas nin. La aliaj personoj spegulas nian karakteron. Ĉio, kio ne plaĉas al ni ĉe la aliaj, malkaŝas niajn proprajn mankojn. Ĉio, kio plaĉas al ni ĉe la aliaj, montras niajn kvalitojn. La konfliktoj kun nia ĉirkaŝaĝo malkaŝas niajn internajn konfliktojn. Solvante ilin, ni malaperigos ankaŝ la eksterajn konfliktojn. La malsanoj indikas al ni, en kiu tereno ni malsukcesas kaj kie ni



El: komiksoj.wordpress.com



bezonas realigi ŝanĝojn. Niaj veraj malamikoj estas kolero, ĉagreno, malmamo, timo kaj ĉiuj negativaj sentoj.

Mi ne plu timas al la kuracistoj, ĉar ili estas nur viktimoj de malsana sistemo. Neniu el ili komencis malfacilajn studojn por damaĝi al la personoj. Ili ja trapasis la hipokratan ĵuron. La sansistemo en nia lando estas tielnomata *socia*: tio signifas, ke ĉiuj loĝantoj havas rajton al la kuracista flego. Tiuj, kiuj laboras, kontribuas per kotizoj al la komuna kaso; anstataŭ tiuj, kiuj ne povas labori, pagas la ŝtato. En la sanasekuran kason alvenas ĉiumonate sufiĉe da mono. Sed la korupto de ĝiaj manaĝeroj elsuĉas la

fontojn en iliajn proprajn poŝojn. Kreskas burokratio, malkreskas la nombro de specialistoj. La kuracistoj, flegistinoj kaj alia personaro ricevas malmulte da mono; plifortiĝas ilia laceco, frustracio, elbruliĝo. Iliaj strikoj estis malpermesitaj de ŝtato. Ili ne rajtas plendi. Tiuj, kiuj povas, forlansas la landon, ĉar malantaŭ la landlioj ili trovas pli bonajn kondiĉojn. Restas nur unu solvo: okupiĝi mem pri sia sano. Vere kaj ĉiutage. Ne nur tostante “*je nia sano!*”.

---

Noto de la redakcio: Post tiom da malĝojoj, vi konkludas ke Jana ja meritas tosti, kiel ŝi ja faras en ŝia foto, ĉu ne?

## *Post semado, ni kultivu kaj rikoltu*

## **Raporto**

La 16-an kaj 17-an de majo 2015 okazis la 26-a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Ĵanejro, en la LBV-lernejo *José de Paiva Netto*. La evento, ni diru, estis malgranda, tamen, kiel la boteletoj kiuj enhavigas bonodorajn parfumojn, ĝi estis sufiĉe familiara kaj kun varia programo. La ĉeftemo, *Ni semas kaj semas konstante*, evidentigis diskuton pri disvastigado kiel celo kaj interesa seminario en la portugala zorgis pri tio. Kadre de ĝi, bone parolis Márcio

Allan Argolo Santos, Carlos Alberto kaj Rafael Zebetto. Aliaj programeroj kiuj rilatis al disvastigado estis la prelego de Fabiano Henrique pri virtuala Esperanto-revuo *Esperanto Ilustrita* kaj la prelegeto de Márcio Santos pri la projekto *Esperanto ĉe “Bienal”*. Prelegoj pri aliaj temoj estis ankaŭ bonkvalitaj: la profesoro Fernando Pita komparis brazilan kaj esperantan literaturon de la jaroj 1950-1980; la kuracisto Elmir dos Santos milde parolis pri *Magnetismo kaj la homa in-*

*terrilato*, la aerarmeaj emeritaj oficiroj Paulo Carvalho konigis al ĉiuj la imponecon de la aerŝipo *Graff Zeppelin* kaj la muzikisto Alfredo Aragón regalis la publikon per la belsona prezentado *Sinfoniorkestro - kio ĝi estas*. Ni ankaŭ menciis la buntan artan vesperon organizita la samideanino Dirce Sales. Ĝin inaŭguris unu-minuta

paŭzo omaĝe al la forpasinta aktivulino Marly Freitas. Sekvis pluraj prezentadoj de skeĉoj, poemdeklamadoj kaj muzikoj. Ĉio menciindas, tamen plej elstarigis deklamado de *La Vojo* far Neide Barros, la peco *Petola Sambo* far Dirce Sales kaj Tania Paixão kaj la skeĉo surprize ludata de Elmir dos Santos.

**Poezia Angulo**

**Pablo Neruda**



Poemo III de la  
"Libro de demandoj"  
(Pablo Neruda)

Esperantigo:  
Paŭlo Nascentes



III (Originale)

Diru: ĉu estas nuda la rozo  
aŭ havas nur tiun robon?

Dime, la rosa está desnuda  
o sólo tiene esse vestido?

Kial jen la arboj kaŝas  
la splendon de la radikoj?

¿Por qué los árboles esconden  
el esplendor de sus raíces?

Kiu aŭdas la rimorsojn  
de l' aŭtomobilo krima?

¿Quién oye los remordimientos  
del automóvil criminal?

Ĉu io pli trista en la mond'  
ol senmova trajn' subpluva?

¿Hay algo más triste en el mundo  
que un tren inmóvil en la lluvia?



(Neruda, Pablo. *Livro das perguntas*  
Trad. Olga Savary. Porto Alegre:  
L&PM, 2004. 156p. Edição bilíngue).

# ESPERANTO



NA **BIENAL  
DO LIVRO  
2015 RIO**



Visite nosso estande de 3 a 13 de setembro  
Pavilhão Verde, Q 09, junto à Praça de Alimentação  
Haverá exposição e lançamento de livros

Info: [disvastigo.aerj@gmail.com](mailto:disvastigo.aerj@gmail.com)

**51-a Brazila Kongreso de Esperanto - BKE**

**36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso - BEJK**

**14-a Infana Kongreseto de Esperanto - BIKE**

**Esperanto**  
Lingvo Internacia



**Loko:**

Universidade Federal do Amazonas - UFAM  
Faculdade de Ciências Agrárias - FCA  
Mini Campus, 22 - 26/jan/2016

Manaúso - Amazonio

**Informoj kaj Aliĝoj:**

[esperanto.org.br/kongreso](http://esperanto.org.br/kongreso)

**Organizantoj:**



**UFAM**

**Apogantoj:**



**FACULDADE DE  
CIÊNCIAS AGRÁRIAS**



# 9-a Esperanta Kongreso de la Ŝtato Pan-Paŭlo

Esperanto aplikata al  
Komerco kaj Turismo.

Paranapiakabo  
10,11 kaj 12 de Oktobro 2015



Informoj kaj aliĝoj  
[www.easp.org.br/paranapiacaba](http://www.easp.org.br/paranapiacaba)

Loko:

Klubo União Lira Serrano

Strato Antonio Olyntho, sen numero



Realigo

Organizado

Apogo



Brazilia Esperanto-Ligo

